4-a Jaro. N-o 157 APERAS SEMAJNE 6. Oktobro 1927



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanty

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo

Sekve de la recenzo pri "Vortoj de Profesoro Th. Cart", aperinta en n-o 137 de "S-ulo", la aŭtoro sendis la ĉi-suban leteron:

Servoz (H-te Savoie), 29. 7. 27.

"Estimata Sinjoro,

Ĉu vi ne ankoraŭ citos por viaj lernantoj kaj legantoj jenajn parolojn de D-ro Zamenhof?

Kontraŭ tiu ĉi mensogo, malnobla kaj kalumnia kulpigo — ke la Esperantistoj ne amas sian patrujon — mi protestas plej energie kaj protestas per ĉiuj fibroj de mia koro!... La vera patriotismo estas parto de tiu granda tutmonda amo, kiu ĉion konstruas, konservas kaj feliĉigas. La esperantismo, kiu predikas amon, kaj la patriotismo, kiu ankaŭ predikas amon, neniam povas esti malamikaj inter si... Ho patriotismo, patriotismo, kiam fine la homoj lernos kompreni ĝuste vian sencon! (Parolado de D-ro Z. en Londona Guild Hall 1907, Vortoj de Zamenhof, eld. Kühnl.)

"En tio, kiel en la lingvaj demandoj, disĉiplo mi estas de D-ro Zamenhof kaj ĉiam penis por kompreni la ĝustan sencon de patriotismo. Ĉu tia sintenado estas sintenado de ŝovinisto? Ĉu Jaurès, mortigita de ŝovinisto, estas mem ŝovinisto, ĉar li amis sian patrujon?"

"Ho, sinjoro, malgraŭ niaj malsamaj vidpunktoj, mi ĉiam honeste deziris vin kompreni, esti justa kontraŭ vi. Ĉu mi ne povas esperi la samon de vi kontraŭ mi?"

Via Th. Cart.

Mi povus letere respondi al la Prezidanto de la Esperanta Akademio kaj diri, ke mia deziro esti justa, estas ja granda kaj sincera. Mi povus sendube kontentigi s-ron Cart per la simpla konfeso, ke mia profunda malŝato por la patriotismo eble igis min ne tute ĝuste kompreni la sencon de liaj vortoj.

Mi ankaŭ volonte konfesus, ke Jaurès estis bona patrioto, bona internaciisto kaj ne ŝovinisto. La ŝovinismo estas ja nur patriota fanatikismo, kaj certe Jaurès ne estis fanatikulo. Sed en miaj okuloj tio tute ne pravigas la patriotismon...

Grava kaj aktuala estas la demando. Pri ĝi malklareco regas en multaj cerboj. Tial, anstataŭ respondi private al s-ro Cart, mi volas profiti la okazon por diri publike mian personan opinion.

Mi ne ekzamenos, ĉu D-ro Zamenhof estis bona patrioto aŭ ne. Oni nur rimarku, ke la ĉi-supraj liaj vortoj simple pruvas, ke homo havanta amon por la tuta homaro ne povas ne ami sian "patrujon", ĉar ĝi estas ja parto de la tuto.

Aliparte, en la lasta n-o de "SR". K-do Nekrasov, sin apogante sur alia cito el la Zamenhofaj paroloj, ne malpli logike argumentas kaj pruvas, ke la aŭtoro de esperanto estis vera sennaciulo.

Ĉe tia konstato oni ne vidu profundan, nereduktеblan kontraŭdiron. Sennaciulo, senpatriulo povas ja tre logike argumenti, ke li deziras la formalaperon de la diversaj nun ekzistantaj patrioj ĝuste pro amo al la lando aŭ regiono por kiu li sentas tiun specialan amon.

Senpatriulo estas homo konvinkita, ke paco kaj bonstato regos en la mondo nur kiam la historia evoluado estos atinginta la stadion, kiam la ekonomia mondmastrumado estos tute unueca. Kaj tia unueco ne povas akordiĝi kun la ekzisto de "patrioj", t. e. de sendependaj kaj suverenaj unuoj.

Kiu havas tian konvinkon, tiu observas la sociajn kaj politikajn okazaĵojn per tute aliaj okuloj ol tiuj de patrioto, kies ĉefa zorgo estas atenti pri la bonstato kaj gloro de iu pli malpli granda terparto.

Por klarigi kaj pravigi tian konvinkon, necesas koni la devenon de la patriotismo, ĝian historian rolon, ĝian nunan staton kaj plie montri, ke la moderna socia strukturo imperialisma tendencas nepre formalaperigi la ekonomian bazon de la patriotismo.

Ĉe la komenco de tiu studo mi devas tuj konfesi mian embarason. Ne la manko de faktoj kaj argumentoj ĝenas min, sed, male, ilia abundeco. Ĉu mi sukcesos elekti la plej trafajn, la plej konvinkajn? Ĉu mi ne estos devigata daŭrigi pli longe, ol mi unue intencis, la esploradon tra la amaso de materialo, kiun mi havas je mia dispono? Kaj ĉu mi trovos la necesan tempon por klare kaj kiel eble plej koncize starigi mian tezon?

La temo estas iom abstrakta. Mi petas do la legantojn, ke ili penadu ĝuste kompreni. Kaj se okazos, ke mi skribis iom nesufiĉe kompreneble, mi antaŭdankas al tiuj, kiuj atentigos min pri tio.

(Pluo sekvos) E. Lanty.

MIA BUĜETO

Antaŭ kelkaj monatoj mi iniciatis la rubrikon "Tago el Mia Vivo", *kaj mi ĝojis konstatante, ke tiu mia ago trafis la celon, nome, stimuli inter la K-doj originalan verkadon eĉ plej simplan, tamen samtempe interesan por nia organo. Tamen estas certe ankoraŭ grandega plimulto, kiu nenion verkis. Ĝis nun mi legis kun intereso ĉiujn "Tagojn", sed ĉar ili estas de malsamaj profesiuloj, mi devas konstati, ke ni ankoraŭ ne ĉerpis plenan valoron el la rubriko. Ja ni povis birdperspektive prezenti al ni la tagojn de diversprofesiaj K-doj laboristoj en diversaj landoj. Sed* komparado *de kondiĉoj de* samprofesiuloj *en* malsamaj *landoj liveros eĉ pli valoran kaj interesan informon. La temo estas simpla kaj provizas oportunan okazon por unuafojan provverkon. K-doj, mi alvokas vin ĉiujn partopreni.*

Laŭ sugestio de K-do Lanty en "S-ulo" mi aldonas artikolon "Mia Buĝeto". Ja per la du rubrikoj kune ni pli intime konos unu la alian.

Profesie mi estas instruisto en ŝtata lernejo elementa. Mi laboradas en la lernejo ĉiusemajne 5 tagojn, tage 5½ horojn. En mia klaso estas nun 51 knaboj, aĝaj je 12-13 j. Korektado de kajeraj ekzercoj kaj antaŭpreparo de lecionoj okupas kelkajn pluajn horojn hejme.

Ĉar mi jam instruadis dum 6 jaroj kaj 3 pluaj jaroj estas alkalkulataj pro interrompo de studjaroj sekve de la milito, mia salajro nuna estas 267 funtoj sterl. jare. Sed de tiu sumo estas deprenataj 5%, t. e. sume 13.35 funtoj sterl., deviga pago al ŝtata instituto por pensio. Rezulte, mia fakta enspezo nunjara estas 253.65 funtoj sterl., tiel ke mi ricevas regule ĉiumonate ĉekon por 21.1375 funtoj sterl.

Dum la jaro mi ĝuas la jenajn ferioj: — Paske — 2 semajnojn, Pentekoste — 1, Somere — 4, Kristnaske — 2; do sume 9 semajnojn kun salajro. El ĉio ĉi vidiĝas, ke mia fakta enspezo pro lerneja instruado estas 253.65 funtoj sterl. por 43 semajnoj da laboro. La jarsalajro aŭtomate pligrandiĝas per 12 funtoj sterl. ĉiujare.

Tiu estas mia sola enspezo, sed la edzino ankaŭ ricevas iom da mono, kiu ebligas al ni vivadi pli komforte ol aliel estus. Pro donaco kaj testamento de mortinta onklo, kiu dum ŝia juneco alprenis ŝin kaj ŝin prizorgadis preskaŭ kiel propran filinon, la edzino posedas 800 funtoj sterl., kiu havigas al ŝi renton de 40 funtoj sterl. ĉiujare, kaj domon. Pro tiu domo ŝi ricevas pagon da 85 funtoj sterl. jare. Antaŭ la morto de ŝia onklo ni mem loĝadis en tiu domo, sed poste, por ke ni estu tre proksime al la vidvina onklino, kiu ne havas propran idon, ni transloĝiĝis en la nunan hejmon. Sekve de tio ni loĝadas en aparta unua etaĝo de la domo, kies teretaĝon okupas la onklino, al kiu apartenas la tuta domo. Pro la parenceco ni pagas al la onklino ĝuste sumon egalan je tiu, kiun ni ricevas pro la domo testamentita al la edzino, t. e. 85 funtoj sterl. jare. Aliu devus pagi 130 funtoj sterl. jare por nia loĝejo, ĉar ĝi enhavas 5 ĉambrojn krom banĉambro, kaj kuŝas en bela distrikto. La ĉambroj estas grandaj kaj altaj, sekve troviĝas sufiĉe da spaco, sunlumo kaj bonaero por miaj du filetoj. Rezulte mi povas diri, ke la loĝado kostas al mi neniom, kaj la tuta fakta enspezo de ni ambaŭ estas 378.65 funtoj sterl. ĉiujare.

Sed aldone je tio, por doni veran raporton pri mia buĝeto, mi devas mencii, ke la onklino, kiu tre amas la filetojn, de tempo al tempo donacas al ili ŝuparon aŭ malgrandan vestaĵon, kaj ĉiusemajne 0,25 funtoj sterl. al la edzino por ke ŝi, kiu ne estas korpe tro fortika, pagu iom da helpo je domlaboro dum tri matenoj el la semajno. Tiu sumo sufiĉas por duone pagi la helpistinon, kiu ankaŭ tagmanĝas kune kun la familio. Plie, la tuta familio preskaŭ ĉiutage temanĝas[1]) ĉe la onklino, fakto, kiu ankaŭ konservas al ni iom da mono.

Nun pri la elspezoj. Estas malfacile precize taksi ilin, ĉar kelkaj el la pagoj varias de jaro al jaro, ekzemple por kuracisto, radio. Sed mi prenis la ciferojn de unu jaro kiel eble plej precize ĝis la lasta penco, faris bilancon, kaj tiam forigis ĉiujn postciferojn en tria kaj plia lokoj. Sekve la bilanco aspektas jene:

Enspezoj:	funt. sterl.
Instruista salajro	253.65
800 funtoj sterl. je 5%	40.00
Pago pro domo	85.00
Sume	378.65

Elspezoj:	funt. sterl.
Dommastrumado	150.00
Loĝeja pago	85.00
Vestaĵoj, ŝuoj ktp.	40.00
Gaso por kuirado	18.00
Karbo dum vintro	5.00
Elektra lumo	7.50
Kuracisto	13.00
Asekuro por mem ricevi subtenon dum malsano	3.80
Vivasekura pago je 100 funtoj sterl.	2.80
Pago por ricevi 100 funtoj sterl. post 11 jaroj por eduki infanojn	7.65
Cigaredoj, tabako	13.00
Asekuro de mebloj kontraŭ incendio	0.30
Asekuro de domo kontraŭ incendio	0.75
Lavaĵoj	6.50
Instruista unuiĝa kotizo	1.30
Instruista Laborligo (TLL)	0.50
Partia kotizo	0.45
SAT, "S-ulo", kaj "SR"	0.65
Esperantaĵoj, loka grupo	1.35
Radio, permesilo, akcesoraĵoj	3.00
Gazetoj	3.00
Repago de ŝuldoj al parencoj	12.00
Donacoj, diversaĵoj	3.10
Sume:	378.65

La legantoj rimarkos, ke krom per asekuraj pagoj, mi ŝparas neniom el la jarenspezo. Kialoj estas:

1. post 30-jara servado mi ricevos ŝtatan pension;
2. la edzino jam posedas domon kaj 800 funtojn sterl., t. e. multe pli ol mi povus ŝpari el mia salajro dum tuta vivo;
3. de gepatroj kaj onklino ni verŝajne iam ricevos plion.

Do, kiel ni povas antaŭvidi, ne necesas ŝpari, kaj ni povas jam nun elspezi ĉiom por vivadi komforte kaj bone prizorgi la filetojn.

Jen estas la faktoj, malkaŝe antaŭmetataj al la K-daro, kvazaŭ al "intima amiko". Mi devas supozi, ke la sorto multe pli favoris min ol kelkajn, eble eĉ multajn, el la SAT-anaro. Estas parte pro tio, ke mi estas socialisto. Mi asertas, ke la komfortoj, plezuroj, certeco de la vivrimedoj, kiujn ĝuadas mi kaj mia familio, estas nur tiom, kiom *ĉiu* homo *rajtas postuli* por si mem kaj sia familio. Ĉiu infano *rajtegas* la plej bonan medion, en kiu ĝi kapablos kreski ĝis plena evoluo korpa kaj spirita. Ja, ili tion ne ricevas!

Anglio (2978).



[1]) Laŭ angla kutimo. *Red.*

El la sendependa Ĉeĥoslovakio

En la listo de la ŝtatoj laŭ la multekosteco Ĉeĥoslovakio estas unuvice, sed laŭ la salajroj lastvice.

Ofte ni aŭdas ion pri la "mondprezo". Oni parolas pri ĝi ĉiam, kiam oni povas motivi, ke tio kaj tio ne estas kara, aŭ tion kaj tion oni devas plikarigi. Male, pri la mondprezo ni aŭdas neniam, kiam la komercaĵo estas pli kara. Se estas la eksterlanda prezo plimalalta ol ĉe ni kaj se ne volas nia fabrikanto por la sama prezo ĝin vendadi, li vokas limdepagojn. La limdepagojn ŝarĝas la pli malkaran eksterlandan komercaĵon kaj tiel ĝi plikariĝas. Kompreneble al tio necesas politika potenco kaj ĉi potencon por plialtigado donas burĝaro, ekz. okaze de la batalo kontraŭ t. n. agrikulturaj limdepagoj kaj ĉe aliaj pli malgravaj aferoj.

Kiam ĉeĥoslovaka laboristo plendas kontraŭ la kareco, li aŭdas, ke alilande ĝi estas ankoraŭ pli granda. Sed la afero estas tute alia, kiel pruvas la indekso de komercaj ciferoj kompare kun jaroj 1913—1927. La ciferoj de la indekso montras amplekson de la prezoj inter ĉi jaroj, kaj ĉi ciferojn necesas kompreni tiel, ke al aĉetado de fiksaj speckomercaĵoj, kiuj kostis en la jaro 1913 — 100, nunjare necesas tiom, kiom indikas la cifero de la indekso. Laŭ indeksa cifero plej grandan altigon montras Rumanio, kie la indekso al finjaro 1926 atingas numeron 3100, poste sekvas Bulgario 2734, Hungario 1819, Finnlando 1101. Post ĉi tiuj ŝtatoj, kiuj — precipe la unuaj tri — estas neeble envicigi inter la ŝtatoj ordigitaj kaj kiuj estas ŝtatoj

de sanga diktaturo kaj kie estas regado de l' riĉuloj kaj potenculoj tenata perforte, sekvas en tuta gloro Ĉeĥoslovaka respubliko kun indekso komence de januaro 1927 — 979. Nur nun sekvas pluaj ŝtatoj: Belgio 856, Italio 681, Francio 627, Hispanio 186, Nordlando 177, Polio 177, Kanado 150, kaj tie, kie la indekso estas notita entute sub numero 150. Tiel Germanio, kiu en 1922 havis indekson 34 182, sukcesis ordigi sian situacion al bona stato t. e. al cifero 137, ĉar la ŝtata administrado bone sukcesis subpremi egoistajn tendencojn. Tiujn ĉi tendencojn, kiel ni vidas el la konstante pli granda kareco, ĉeĥoslovaka registaro subtenas. La bildo de ĉi tiu netolerebla situacio ne estas plena, se ni rigardus nur al la multekosteco. Necesas alrigardi ankaŭ la laborgajnon, kaj tie nun distingiĝas, ke dum ni estas apud ultramalordigitaj ŝtatoj gvidantaj en la multekosteco kaj sur la kvina loko en la mondo, ni estas ankaŭ unuaj — sed de malantaŭe — la laborgajnoj. Salajroj kaj laborgajnoj estas ĉe ni pli malgrandaj ol tie, kie la multekosteco estas ne tiom netolerebla. Estas interese, ke la situacio en aliaj landoj pasintjare pliboniĝis, sed ĉe ni malpliboniĝis.

Tradukis el "Nová Doba"
V. Lorenc (7321).

Letero de malliberigita K-do en Lodz

Ĉi-sube "Letero de K-do Nacevski". La sendinto enmetis ankaŭ la originalan leteron de K-do N. Oni certe mem komprenas, kial la letero estas skribita sur tiel malgrandega folieto: K-do N. sendis ĝin al lia frato pere de iu K-do, kiu finsidis la punon, kaj por ke "oni" ĝin ne trovu ĉe li, K-do N. devis skribi sur malgranda, facilkaŝebla paperaĵo. La "letero" estas kliŝigita en sia originala grandeco.

Severa efektiveco faris, ke mi troviĝas inter la muroj de malliberejo. Tiel mi pligrandigis la krom tio jam tre grandan nombron da politikaj malliberuloj en Polio. Komence mi pensis, ke mi certe liberiĝos. Kontraŭ mi ja ne estis granda kulpigo: mi estis arestata pro tio, ke mi troviĝis en la vicoj de la Unuamajo-festantoj ĉe la standardoj de la komunista partio. Oni kondamnis min al 2½ jaroj da mallibero kaj senigo de ĉiuj rajtoj.

Tiel, K-doj, aspektas la libereco en eŭropa, "civilizita" lando. Mi volas jam malatenti la fakton mem, ke la registaro persekutas komunistojn. Tiu persekutado superas la limon de ĉia ebleco. La polico arestas ne nur komunistojn, sed multe da homoj nenion sciantajn pri komunismo, eĉ 14—15-jarajn infanojn. Tio okazis ankaŭ en mia proceso. Inter 23 arestitaj troviĝis 19, kiuj neniam partoprenis la agadon de l' kompartio, tamen 15 estas kondamnitaj al 4, 2½ kaj 1½ jaroj. Unu akuzito, 14-jara infano, prezentis atestantojn, ke li en tiu tago dum la tuta antaŭtagmezo preĝis en preĝejo kun la tuta familio kaŭze de l' datreveno de l' morto de familiano; nur post la tagmanĝo li ekaŭdis muzikludon, kaj kiam li alkuris por ĝin aŭskulti, oni arestis lin. Ĉu tio ne estas ridiga komedio?

Mia mallibereja vivo ankaŭ ne havas belajn kolorojn. Por plibonigi la vivkondiĉojn ni ofte devis batali. Dum pli ol unu jaro de mia arestiteco ni naŭfoje batalis per simpla ago kaj dufoje per malsato. Multiuj malsaniĝas, ĉar la vivrimedoj kaj la aliaj elementaj bezonoj estas en plej terura stato. Plej ofte oni malsanas je ftizo, reŭmatismo kaj suferas je ventro kaj okuloj. Ni havas nian komunan bibliotekon kun pli ol 1000 libroj. Burĝajn gazetojn ni povas aboni.

Mi petas ĉiujn K-dojn, ke ili laŭpove sendu esperantajn librojn por nia mallibereja biblioteko laŭ la adreso: A. Nacevski, Marysinska 3, Lodz, Polio. Por ĉio mi dankas en la nomo de ĉiuj malliberuloj.

A. Nacevski (SAT-ano 5981).



SAT-anoj ne pruntedonu vian Jarlibron al kiu ajn. Ĉiam postulu, ke servopetanto montru sian membro-karton. Gardu vin kontraŭ profitemuloj kaj parazitoj!

ALTAJ SALAJROJ EN USONO

La Internacia Laboroficejo ĵus eldonis raporton de sia Vicdirektoro, s-ro Butler, pri Industriaj Rilatoj en Usono.

Unu el la plej interesaj ĉapitroj en tiu libro pritraktas la doktrinon pri altaj salajroj. El la sciigoj kolektitaj s-ro Butler kalkulas, ke la valoro de la manufakturaĵoj de Usono pliiĝis je 149 procentoj dum la lastaj dek jaroj, sed ke salajroj pliiĝis eĉ plie (175 procentoj). La meza valoro produktita ĉiujare de ĉiu laboristo plialtiĝis de 3 447,84 al 6 892,93 dol., dum la meza jara salajro pliiĝis de 579,14 al 1 253,93 dol.

Plene kunkalkulinte la pliiĝon de la vivkosto dum la sama periodo, oni povas konkludi, ke la aĉetpovo de salajroj pliiĝis je 37,1 procentoj. Certe la vivnivelo de la laboristoj estas plej alta en la plej bone organizitaj metioj. Tamen estas sendube, ke okazis ĝenerala plialtiĝo de la prospero de la Laboristaro en Usono kune kun pliiĝanta produktado.

S-ro Butler diras:

"Usonaj mastroj nun ĝenerale esprimas la opinion, ke altaj salajroj estas profitaj, kiel instigo al produktado, kiel kaŭzo de pli bonaj sentoj ĉe la laboristoj, kaj ankaŭ tial, ke ili kreas ĉe la salajruloj aĉetpovon, kiu nutras kaj subtenas prosperon. La pago de bonaj salajroj certe produktis tiujn rezultatojn, sed se oni imagus, ke la meza Usona mastro intence akceptis politikon favoran al altaj salajroj, tial ke li antaŭvidis tiujn rezultatojn, oni supozus en li antaŭvidon, kiun li ne povus pretendi. Estas ja vero, ke s-ro Henry Ford starigis minimuman salajron de 5 dol. por okhora tago jam en januaro 1914. Tiel farante, li radikale deflankiĝis de la tiam kutimaj salajroj kaj kaŭzis grandan maltrankvilecon kaj proteston ĉe siaj konkurantoj. Li faris tion, laŭ sia propra klarigo, tial ke li opiniis, ke ĝi estas bona negoco, kaj li trovis ĝin "unu el la plej bonaj kostmalpliigantaj procedoj, kiujn ni iam faris." Tamen lia ago estis escepta kaj ne estis ĝenerale imitita. Do la lasttempa pliiĝo de salajroj povas esti atribuata al la ekonomiaj kaŭzoj antaŭe priskribitaj, kaj ne al intencita politiko. Tamen, oni trovis, ke altaj salajroj kunportas kompensojn, kiujn oni ne konjektis. Estas sendube, ke ilia efiko kiel stimulo kaj al produktado kaj al konsumado estis plibone komprenita de la mastroj ol iam antaŭe. La fakto, ke multaj miloj da laboristoj posedas superreston super la nuraj vivnecesaĵoj signifas pliigitan postuladon por ĉiuspecaj komercaĵoj, alivorte, pli konstantan merkaton kaj stimulon al plia produktado. Pro tiuj motivoj, la principo estas nun larĝe akceptita ĉe usonaj mastroj, ke estas bona politiko eviti laŭeble la malpliigon de salajroj, ke laŭpeca salajro por la sama laboro devas ne esti malaltigita, kaj ke oni devas serĉi ŝparrimedojn ĉie alie, antaŭ ol tuŝi salajrojn.

Laŭ la esp.-informservo de Internacia Laboroficejo.

La anarkiista movado en Sud-Ameriko

En la anglalingvaj landoj ni ankoraŭ ne povas konstati, ke niaj ideoj enradikiĝis, spite la eminentaj propagandistoj. kiuj travojaĝis la usonajn landojn kaj ankoraŭ estas tie. Emma Goldmann en oktobro venis al Kanado kaj estas dezirinde, ke ŝi havu sukceson en Kanado kaj en la usonaj ŝtatoj por helpi krei movadon. Fine de la jaro 1925 ĝis junio 1926 Rudolfo Rocker entreprenis propagandvojaĝon tra ĉi-landoj, sed lia propagando turnis sin nur al la hebrea movado laborista.

En Nov-Yorko nur monate estas eldonata "Road to Freedom". Sed la hispanaj anarkiistoj plue eldonas la semajnan organon "Cultura Obrera" de Pedro Esteve. La italoj en Newark havas individuan organon "L' Adunata di Reffratari" kaj anarkosindikalistan ĵurnalon "Germinal" en Ĉikago. En Tampra, kiu estas maljuna centro de la anarkiista movado, oni eldonas malgrandan ĵurnalon "Orientacion". La Sakko-Vanzetti-proceso okupas la popolamasojn en la usonaj ŝtatoj kiel ankaŭ en la tuta mondo. Malgraŭ tio la anarkiismo ne estas faktoro sociala en la anglasaksa Ameriko. Almenaŭ ne faktoro konsiderinda kaj plej malmulte en angla lingvo.

En Meksikio la situacio estas alia. Tie dum kelkaj jaroj estis kreata bonega bastiono la "Confederacio General de Trabajadores", kies kvina kongreso okazis la 1.—9. julio en la ĉefurbo. Tiu ĉi movado klopodas por la eldono de reprezenta organo, ĉar "Sagitario", eldonita de San Louis Potosi, ne sufiĉas por la granda movado de la lando. Grupo de junaj homoj plena je energio kaj entuziasmo fondas presejon por la eldono de semajna gazeto kaj propagandbroŝuroj. Por tio ili bezonas 15 500 pesojn, kiuj estas pageblaj dum unu jaro. Tie ili eldonas "La Batalla", kiu devos esti la necesega esprimrimedo por nia movado en Meksikio.

En aŭgusto J. M. Rangel kaj aliaj samideanoj regajnis la liberecon, kiun ili perdis pro partopreno en malsukcesinta ribelo en 1913. La maljuna Rangel estis tre aktiva en la bataloj de la liberala partio kontraŭ la diktatoreco de Porfirio Diaz.

En Kubo regas perforta reakcio, kiu eĉ ne timis fari mortigon, kiel montris la aferoj de Enrique Varona kaj Alfred Lopez. La lasta estis sekretario de la "Federacio Obrera". Varona estis mortigita per malkuraĝa maniero. Lopez estis arestita kaj forigita pro maloportuneco al la registaro. La anarkiista gazeto "Tierra" kaj la anarkisindikatista gazeto "El Progreso" estis malpermesataj de la diktatoreco de Kubo. La saman sorton trafis "El Libertario", kiu provis plenigi la breĉon. Nuntempe ne estas eble fari propagandan aŭ organizan laboron en Kubo.

En Kolumbio oni povas konstati diversajn provojn por revivigi la anarkiistan movadon. La centro troviĝis en Baranquillas, Bogoto, Santa Maria ktp. En mallonga tempo verŝajne ni povos konstati porliberecan movadon en tiu ĉi lando. Dank' al la propagandvojaĝo de K-do Julio Diaz estas starigitaj grupoj en San Jose, Costa Rica, kiuj jam tiel sukcesis, ke ili eldonas malgrandan gazeton. En Centra-Ameriko niaj ideoj preskaŭ ne estas konataj inter la Laboristaro.

En Guyaquil kaj Anito, respubliko Ekvadoro, troviĝas nombro da homoj, kiuj simpatias al ni, sed mankas kapabla persono, kiu tie povus krei anarkiistan movadon sur solida fundamento. Komitato laboras por restarigi laborist-organizon sur bazo libera.

(INO) Esperantigita el "Road to Freendom".

BORIS STEFANOV

Tio estas la nomo de juna kaj kuraĝa bulgaro, defendanto de la rajtoj de la sklavigitaj dobruĝanoj, eksdeputito en la Bukureŝta parlamento, martiro pli frue de la Siguranca de Averesko, nun de la Siguranca de Bratiano.

Boris Stefanov kuŝas jam tutan jaron en antaŭa malliberejo ne pro iu farita krimo, sed nur pro siaj konvinkoj, kiuj ne plaĉas al la rumana rabista oligarĥio, perforte preninta Transilvanion, Besarabion kaj Dobruĝon. La sola kulpigo kontraŭ nia samlandano estas la sekvanta frazo, kiun li



Boris Stefanov

skribis en sia artikolo pri la Besarabia demando: "La politiko pri memdestino de la popoloj estas politiko demokrata, kaj estas nek s-ro Bratiano, nek la ŝtatuloj de la grandaj potencoj, kiuj havos la lastan vorton, sed la besarabia popolo mem."

La samon li parolis publike kaj skribis en siaj artikoloj ne unufoje pri sia naskiĝlando Dobruĝo.

Jen la neaŭdita "krimo" de la popola aganto kaj gvidanto Boris Stefanov. Pro tiu "krimo" Boris Stefanov kuŝas pli ol unu jaron en la malliberejo, kaj la 26 p.m. li estis starigita antaŭ la Bukureŝta milita tribunalo kune kun unu studento, du laboristoj kaj unu studentino, kiuj kuŝas en la malliberejo jam tri jarojn.

La afero de nia amiko estis ekzamenota jam dufoje (la 18-an de februaro kaj 13-an de majo), sed ambaŭ fojojn prokrastata. Fine Bratiano decidis lin "juĝi". Tiun fojon la ekzamenado de la afero komenciĝis. Estas alvokitaj pli ol 200 atestantoj. La defendo estas entreprenita de la plej konataj rumanaj advokatoj, inter kiuj Kosta Foru, sekretario de la Ligo por defendo de la homrajtoj en Rumanio, Dobresku, prezidanto de la Advokata Ligo, Januĉesku, deputito de la vilaĝana naciista partio k. a.

Laŭ "Amboso", *I. H. K.*

Faktoj kaj komentoj

Usono-Britio.

La jenaj ciferoj el **"Dimanĉa Laboristo"** klare montras kiel la pezocentro de la financa mondo movas sin okcidenten. Aparte notindaj estas la eniroj de Usono eĉ en la britaj kolonioj — Kanado, Aŭstralio (unua tabelo).

Tabelo I

Kapitalo sendita (dum la ses monatoj: jan.—junio 1927)

al	de Britio funt. sterl.	de Usono funt. sterl.
Eŭropo	11 500 000	42 000 000
Sud-Ameriko	8 500 000	30 000 000
Aŭstralio	12 000 000	11 000 000
Kanado	5 500 000	22 000 000
Japanio	nenion	4 000 000
Sume	37 500 000	109 000 000

Tabelo II

Tutkapitalo sendita eksterlanden (por ses monatoj: jan.—junio)

	Britio funt. sterl.	Usono funt. sterl.
1923	91 000 000	39 000 000
1924	66 000 000	77 000 000
1925	39 000 000	114 000 000
1926	63 000 000	123 000 000
1927	57 000 000	157 000 000

Tabelo III

Tutkapitalo disponebla por spekuli en hejm- kaj eksterlandaj aferoj (jan.—junio)

	Britio funt. sterl.	Usono funt. sterl.
1924	106 000 000	640 000 000
1925	124 000 000	740 000 000
1926	132 000 000	810 000 000
1927	160 000 000	1 059 000 000

MARŜIPO KONDUKATA PER UNU SOLA HOMO

La gazeto *"Daily Mail"* anoncas, ke oni konstruas nun en Anglio, plenumante la mendon de amerika petrol-societo, ŝiponcisternon de 12 500 tunoj (milkilogramoj), kiu devas esti funkciigata per unu sola homo. La ŝipo estas ekipita de motoroj "Diesel", kies energio ne estas utiligita senpere kiel antaŭenpuŝa forto, sed por naski elektron. Sur la ponteto estas lokita aparato, kiu tre similas al la regaparato de elektra motorveturilo. Funkciigante turnilon, la ŝipestro povas marŝigi la marŝipon laŭ ĉiu dezirata irmaniero, ĝis rapideco de 11 699 m. Li povas ankaŭ haltigi la ŝipon aŭ ĝin marŝigi malantaŭen. Aŭtomata direktilo subtenas la ŝipon en la dezirata marŝado. La homo sur la ponteto estas sola, kiu okupiĝas pri la konduko de la marŝipo ĝustedirite. La laboro de la cetera personaro konsistas el ŝmirado kaj subtenado de la maŝinoj, purigado de la ŝipo ktp. Ĝi povas do esti limigita je minimumo. Estas nenecese, ke inter la ŝipanaro troviĝu meĥanikistoj kaj elektro-teknikistoj.

Kiel vidate, la homa menso ne haltas, kaj esperebie ĉe la laboristoj ankaŭ progresos la klaskonscio por ke ili kapablu trudi al la mastroj plimallongigon de la labordaŭro.

SENNACIULA SPORTA PAĜO

Historio kaj evoluo de la sportmovado laborista en Germanio

(Daŭrigo[1])

"Laborista Pafula Asocio"

estas la plej juna el ĉiuj asocioj kaj fondiĝis en nov. 1920 en Brunsvigo. La motivo por la fondo estis la deziro kolekti la pafsportamantojn el laborista medio. Ĝi okupas sin pri ĉiuj manieroj de la pafsporto kaj krom tio ankaŭ migradoj kaj kelkaj specoj de malpezatletiko. De 360 membroj ĉe la fondiĝo ĝi nun atingis 5 000, kiuj en pafsporto ĉiuj estas aktivaj kaj je 60% partoprenas aliajn sportspecojn. Propran sportejon posedas 50 unuiĝoj.

"Asocio por Popolsaneco"

ne estas pure sporta kaj volas atingi sian celon per centrigo de la laboristaj unuiĝoj okupantaj sin pri sanecflegado kaj kuracado. Kiel subfakon ĝi akceptis la "*Asocion de liberaj Homoj*", kiu akcelas fizkulturon kaj nudsporton. Ĉi fako havas 2 000 membrojn, la tuta asocio 15 000. Ludejojn, sunbanejojn kaj akvobanejojn la asocio posedas 22. En 1908 ĝi transiris al socialisma mondrigardo kaj laŭ tio plenumas siajn laborojn.

"Laborista Sanigula Asocio"

certe ĝuas plej altan simpation por sia celo helpi proksimulojn kaj kontrastas la burĝan "Ruĝan Krucon". Ĝi fondiĝis en Magdeburgo en 1909 per la centrigo de jam ekzistantaj laboristaj sanigistaj taĉmentoj. Jen kelkaj nombroj el ĝia malegoista agado:

En la jaro	nombro de la sekcioj	membroj	kursanoj	helpoj
1909	13	996	1 200	—
1910	27	1 659	1 483	5 644
1911	46	2 172	2 584	12 387
1912	66	3 760	2 183	15 693
1913	73	4 670	2 980	16 980
1914	103	5 500	3 800	19 600
1915	62	1 855	mankas	statistiko
1917	32	1 153	—	—
1919	68	4 600	—	—
1920	123	9 000	—	—

Ĉiuj asocioj kuniĝas al la "*Centra Komisiono por Laboristsporto kaj fizika kulturo*" kies celo estas propagando por la laboristsporto kaj varbado por la aliĝintaj asocioj, kaj reprezentado de iliaj pretendoj antaŭ la ŝtato kaj la publiko. Ĝi atingas tion per fondo de sportkarteloj, eldonado de presaĵoj, aranĝo de lab. sportkongresoj, interrilatado kun registaro kaj jura defendo per transdono de memoraĵoj. Membroj de la komisiono estas la estroj de la asocioj, kaj tiuj sendas je 100 000 membroj unu delegiton en la administran komitaton.

Jen la stato de la sportmovado laborista en Germanio. Per io la lab. sportmovado sin bone kaj principe distingas de la burĝa. Dum tiu lasta akcelas sportan kaj gimnastan personkulton kaj celas al naciismo, ni vidas nian celon en la flegado de l' fizikkulturo sur popolara bazo, por fortigi Laboristaron korpe kaj mense, kaj eduki klasbatalantojn por la liberigo de l' Proletaro.

[1]) Vidu "S-ulon" n-o 136 pĝ. 5.



LA KONGRESO DE LSI

Gravaj cedoj — Novaj devoj

De la 5.—9. aŭgusto okazis en Helsinki la IV-a kongreso de l' Socialista Sportinternacio Laborista (LSI—Lucerna). Riĉhava tagordo vokis al serioza laboro kaj la estonto devas montri en kia grado la akceptitaj decidoj figuros je la bono de l' laborista sportmovado tutmonda.

Kvankam ni ĉi tie parolas de la tribuno de la tutmonda laborist-sportularo, tamen ne povas esti nia tasko kritiki ĉi tie la laborojn de la kongreso, ĉar tio embarasigus nin, vole- nevole enmiksiĝi je la partitendenca politiko de ambaŭ laboristaj sportinternacioj. Tion ni nepre evitu, ĉar jam estas sufiĉe da disputo sur tiu kampo, kaj ni tute ne kapablus iel influi la kuron de la afero. Estu nur konstatite — nia konvinko estas, ke: La starigo de la unuecfronto estas la unua, nepre necesa kondiĉo por la finvenko de l' Laboristsporto. — En tiu ĉi rilato la rezulto de la kongresa laboro estas negativa. Per tio mi ne volas aserti, ke la volo de la kunvenintoj ne estis sincera. Sed, se en ambaŭ tendaroj, en LSI kiel en RSI, regus iom pli da toleremo — se ĉiu ĉe la aliulo vidus pli la bonan volon kaj mem evitus atakojn malicajn, riproĉojn kaj kalumniojn ktp. — tiam la paco estus proksima, sed...! El la ceteraj laboroj estas citindaj: La kritiko pri la Unua Olimpio Laborista en Frankfurt a. M. — kiu laŭ teknika vidpunkto trovis la aprobon de ĉiuj reprezentantoj. La ankoraŭ pagendan deficiton transprenis Germanio kaj ĝi klopodos — kondiĉe, ke la aliaj landoj pagos la garantifondon — amortizi la sumon sen alia helpo. Por la venonta Olimpio oni post vigla debato fiksis la jaron 1931 kaj Wien kiel festlokon. Rezolucio akceptita devigas la Intern. Oficejon subteni la klopodojn de la Internacia Laboroficejo en Ĝenevo por utiligi la postlaboran libertempon de l' laboristoj al nia movado kaj niaj klasaj celoj. Same la starigo de militsekcioj en diversaj landoj trovis la aprobon de la kongreso. En 1928 okazos en la Laborista Gimnast- kaj Sportlernejo en Leipzig *internacia gimnastkurso*. La kostojn de la vizito devas pagi la landoj, kiuj sendos partoprenontojn. Krom tio la kongreso decidis, plifirmigi la interrilatojn kun la socialistaj partioj kaj sindikatoj. Al la eduko de la laborista junularo estonte estos montrota speciala atento. Unuvoĉe oni akceptis rezolucion por Sacco kaj Vanzetti (bedaŭrinde vane) kaj esprimis sian simpation al "lokaŭtitaj" metallaboristoj de Finnlando.

Kiel konate, krom tio sur la tagordo de la kongreso ankaŭ estis parolado de K-do Kostiainen pri "Laborista Sporto kaj Esperanto". La grundo estis bona. Jam de la unua momento la kondiĉoj de la kongreso favoris al nia afero. Oni ja kunvenis en lando, kies lingvo estas tiom malsimila al ĉiuj aliaj eŭropaj lingvoj, ke preskaŭ ne estis eble kompreni eĉ nur unu vorton. La partoprenantaj esperantistoj pro tio ne estis tro multe ĝenataj, ĉar jam ĉe la haveno atendis nin niaj samlingvanoj kaj daŭre restis ĉe nia flanko. Ĝis nun en kongresoj de LSI ĉiam triumfis tiuj personoj, kiuj krom la gepatra lingvo konis aŭ la francan aŭ la germanan. Sed en finna lingvo eĉ la plej kutimaj internaciaj esprimoj ne estas rekoneblaj. Tion oni spertis en la salutparolado de la prezidanto de Laborista Sportasocio de Finnlando K-do Mikkola, el kiu neniu komprenis eĉ nur la sencon. Post li parolis la ekstera ministro de Finnlando K-do Voimmna. Denove la samaj fremdaj sonoj aŭdiĝas, sed post kelkaj minutoj — kio estas tio — kelkaj novaj disĉiploj de nia kara lingvo mirigite kaj demande rigardas min? — ? Mi kapsignas kaj mia krajono rapidas trans la papero — jes, estas esperanto, kiu flue sonas tra la salono. De nun la traduka lingvo de tiu ĉi tago estas esperanto. Intertempe oni alportas la lokan gazeton "Suomen Sosialidemokraatti" (Finna Socialdemokrato), kiu sur la ĉefpaĝo montras saluton en finna kaj esperanto lingvoj. La okuloj de ĉiuj mondlingvanoj brilas. La sama gazeto en la sekvanta n-o eĉ publikigis la plej gravajn tagnovaĵojn en esperanto. Krom tio ĉiuj helpantoj de la kongresa sekretariejo estas esperantistoj. La gazetservo kuŝas en miaj manoj. Vespere dum la ŝipekskursoj ni mondlingvanoj ja ankaŭ havis sufiĉe da okazo praktiki nian lingvon, ni povis helpi al niaj K-dój per tradukado, kaj ne malofte diskute defendi esperanton. Nun, je la kvara kongrestago, nia K-do Kostiainen en tre delikata kaj simpatia maniero solvis sian taskon. Venis la debato — ĉiuj parolas por ni — ĉu ni jam venkis? Jes ni venkis! Nur la franca delegito motivigas, ke reorganiza laboro ĝenas en tuja lernado, sed tamen li ne kontraŭas. La voĉdonado rezultas unuaniman akcepton (Francio detenas la voĉon) de jena decido:

TRA ESPERANTIO

AL LABORO!

Pli kaj pli evidentiĝas, ke la laboristaj organizoj interesiĝas kaj simpatias al esperanto. Faktoj kiel la rezolucio akceptita ĉe la Pariza kongreso de la Amsterdama Sindikatara Internacio, kiel la decido alprenita ĉe la kongreso de la Socialista Sportinternacio Laborista (oni legu pri tio sur la "Sporta paĝo"), kiel la enmeto de esperantaj klarigaj tekstoj en la grava ilustrita gazeto "A. I. Z." kaj aliaj pruvas tion nekontraŭdireble.

Tiaj sukcesoj estas atingitaj per la metodo, kiun SAT iniciatis tuj ĉe sia fondiĝo: tuj utiligi praktike esperanton. Pri tio sendube neniu hodiaŭ dubas.

Sed estus grava eraro "ekdormi sur siaj laŭroj". La sukceso kreas novajn devojn, necesigas novajn klopodojn. Kaj okazas iafoje, ke ni sentas nin premegitaj per la pezo de la taskoj plenumindaj. Feliĉe la SAT-aparato estas sufiĉe fleksebla por ebligi, ke ni utiligu por la komuna afero ĉiujn laboremajn kaj kompetentajn fortojn. Tial, post interkonsento kun K-do M. Starr, ni decidis komisii al li la aranĝadon de konferenco, kies celo estus per tuŝebla fakto pruvi al la gvidantoj de la laboristaj organizoj ĉiutendencaj la praktikeblecon de esperanto.

La laborprogramo de tiu konferenco povos ekzemple esti jena: 1. Limigo de la labortago. 2. Pliintensigo de la laborista kulturo. 3. Laborista migrado. 4. La virina laboro. 5. Metodoj de imposto kontraŭ riĉuloj ktp.

La laboristaj organizoj estos alvokataj sendi delegiton, kiu raportos en sia gepatra lingvo, se li jam ne scipovas la internacian lingvon, sed la sola tradukligvo estos esperanto.

Ĉiu SAT-ano bone konsciu pri la graveco de la entrepreno. Necesas, ke ni ĉiuj streĉu la fortojn por certigi ĝian sukceson. Necesas, ke ĉiu, kiu povas iel helpi en tiu afero, interrilatiĝu kun la Direkcio de SAT, aŭ kun K-do M. Starr, 25 New Street, Londono SW 1.

Oni ne opiniu, ke senpripense ni iniciatas tiun entreprenon. Ni ja antaŭvidas malfacilaĵojn; sed ne temas pri baldaŭa okazigo de la konferenco. Unu jaro kuŝas antaŭ ni. Necesas tamen jam ekklopodi...

Al laboro!

La Direkcio de SAT.

*

SAT kaj Ili

Sub la titolo "Ni kaj SAT" *Libera Laboristo* raportas pri nia VII-a kongreso. La legantoj de "S-ulo" jam povis legi en la kongresraportoj pri la incidento okazinta komence de la kongreso rilate la anarkistan gazeton. La Organiza Komitato forprenis la ekzemplerojn, kiuj kuŝis sur la tabloj opiniante, ke gazeto, kiu kontraŭbatalas SAT-on[1]), ne rajtas esti propagandata en la kongresejo. La plimulto el la kongresanoj havis alian opinion. Tial tute normale kaj laŭregule la anarkistaj K-doj ricevis kontentigon: la gazeto estis redonita kaj denove kuŝis sur la tabloj.

El tiu fakto lojalaj homoj konkludas, ke SAT estas ja organizo, en kiu regas toleremo, en kiu ĉiu povas defendi kaj akceptigi sian vidpunkton; ke laŭregule kaj normale regas la leĝo de la plimulto.

Alia pruvo pri toleremo kaj gastemo estas la fakto, ke ni eĉ konsentis, ke anarkisto ne-membro de SAT, K-do Liebetrau, povis tamen ĉeesti kaj eĉ partopreni la debatojn.

Sed la *anonima* kunlaboranto de "L. L." havas sendube alian komprenon pri lojaleco. La legantoj juĝu mem: "Jam antaŭ jaroj oni fondis asocion, kies celoj estis internacie kunligi ĉiujn revoluciulojn pere de esperanto, t. e. SAT. Post la Rusa revolucio (oni rimarku, kiom objektive parolas la raportanto: laŭ liaj diroj SAT ekzistis antaŭ la Rusa Revolucio! E. L.) oni konstatis, ke la asocio tute estiĝis komunista, ĉar la plej granda parto da membroj estis komunistoj. (Absoluta eraro! E. L.) Se oni tiam sendis anarkian artikolon al nia organo, ĝi preskaŭ ĉiam estis metata en paperkorbon aŭ ĝi estis parte forstrekita tiel, ke ĝi perdis ofte sian veran valoron. Pli grave estis la fakto, ke nia asocio rifuzis protesti pere de nia organo, kiam anarkiemuloj en Rusio estis persekutataj, ekzilataj aŭ malliberigataj, nur ĉar ili estis propagandantaj ideon, kontraŭ tiaj kontraŭrevoluciaj agoj."

La cetero el la artikolo estas same malice verkita. Ni ne perdu la tempon por refuti evidentajn malveraĵojn, sed ni profitu la okazon por diri, kiu estas nia starpunkto rilate la realan fakton, ke SAT rifuzis protesti kontraŭ malliberigo de "anarkiemuloj en Rusio".

SAT estas superpartia organizo; ĝi konsistas el anoj aliĝintaj al diversaj inter si luktantaj partioj. Por konservi en niaj vicoj la necesan unuecon, necesas eviti enkonduki "la disputpunktojn, kiuj nuntempe disigas la klasbatalajn organizojn". (Gvidrezolucio, Cassel, 1923.) Sekve, ĉu do ne estas klare kaj memkompreneble, ke la ĉi supre priparolita fakto estas ĝuste unu el tiuj "disputpunktoj", kiujn ni devas nepre eviti? Se SAT protestus kontraŭ la menciita ago, ĝi per tio perdus sian senpartiecon; ĝi kvazaŭ agus kiel tribunalo, kiu pretendas juĝi la agojn de la Sovetia Registaro. Kaj ĉiu scias, ke Sovetio reprezentas unu sekcion el la III-a Internacio.

Ĉu do niaj K-doj anarkistaj ne scias, ke ne mankas al la komunistoj argu-

[1]) Ĉe la kongreso mi bedaŭrinde ne havis la tekston de la artikolo, pri kiu estas aludite. Ĉi okaze, por ke ĉiu honesta persono povu juĝi kaj konkludi mem, ni almenaŭ citu parteton el tiu senbaza, senpruva, anonima, nur malicoplena artikolo: "Kian celon havis la SAT-gvidantoj okazigante la kongreson en Rusio? Ili volas sekurigi al SAT konstantan subvencion el la buĝeto de Komintern, ĉar la ĝisnuna financa subteno okazis neregule. Tiucele la komunistoj tute demetis sian eksterlandan 'unuecfrontan felon'. Ili prezentis SAT en ĝia vera naturaspekto..."
Kaj jen estas la konkludo: "Nek unu minuto por fremda celo, nek unu centimo por fremda organizaĵo. Ne unu TLES-ano restu en SAT — tiu moskva agentejo."

"Esperanto — estas celinde, ke en ĉiuj asocioj de LSI okazu kursoj por esperanto. La landaj organizoj estas *devigataj* zorgi pri tio.

La unueca interkompreniĝ-ebleco *devas esti* serĉata kaj *trovata.*

Lernu en ĉiuj landoj esperanton!

Korespondaĵoj kaj publikigaĵoj de la Intern. Oficejo, kaj inter la diverslandaj organizoj laŭeble okazu en Esperanto."

Certe la decido en sia formo kaj signifo estas unika en la ĝisnuna historio de nia movado. Ke ĝi ne restas nur surpapera, montras la fakto, ke ankaŭ la novfondita *Internacia Gazetservo* aperos en esperanto. La dissendo okazos en firma interligo kun la gazetservo de SAT. Tiurilata interkonsento kun EK. de SAT jam trovis reciprokan sankciigon. Sed, ju pli signifoplenaj la cedoj, despli gravaj la devoj.

NIA TASKO

nun estas: zorgi per ĉiuj fortoj, ke la plenumo de la cititaj promesoj ne fiasku pro malatentemo kaj inerteco en niaj vicoj. Tio ne okazos se:

1. Niaj K-doj en ĉiuj landoj klopodos interrilatiĝi kun la centrejoj de la sportmovado laborista.

   (La necesajn adresojn ni volonte peras!)

2. En ĉiuj landoj la propagando por novaj kursoj estas centrigata al la sportmovado.
3. Oni ĉie elektas peranton por prisportaj aferoj.
4. La gazetservantoj de SAT plej rapide tradukus la sportinformojn kaj transdonus ilin al sportorganizoj kaj redaktejoj.
5. Kaj se ili provizus nin per raportoj pri sia-landa sportmovado, kaj ne laste

kunlaborus al Sportpaĝo de Sennaciulo.

Do — ni fosu nian sulkon!

Ad. Wendt (2518)

mentoj por pravigi la agadon de la Sovetia Registaro? Tiajn pledojn kontraŭ anarkistoj ni ricevis abunde. Kompreneble ili ĉiuj iris en paperkorbon. Kaj ni povas sincere deklari, ke la komunistoj eble havus pli da motivoj ol la anarkistoj por plendi pri neapero de siaj artikoloj. Ni ja ricevas abunde materialon el Sovetio, dum la anarkiistoj ne sendas, ĉar ili faras disigan laboron per eldono de propra gazeto.

Nia lojaleco rilate al la diversaj tendencoj estas reala kaj sincera. Kiuj ne volas konsenti pri tio, tiuj estas ĉu fanatike blindaj personoj, kiuj ne kapablas vidi la veron, aŭ mallojalaj individuoj kun kiuj ne utilus polemiki.

E. L.



EL LA REDAKTEJO

Kiel ni laboras

Abundan materialon *ni ricevas. K-doj el la tuta mondo ĝin sendas. Tutajn* 16-paĝajn *kajerojn de "S-ulo" ni povas per ĝi plenigi...*

La gvidanto, K-do Lanty, elektas. La subskribinta redaktoro korektas, maŝinkopias, ordigas. La artikolojn li devas prespretigi. Nur post longa, streĉiga laboro ili estas sendataj al la presejo en Leipzig. Tie la korektadon de la presprovajoj faras nia administranto...

Multfoje la senditaj "artikoloj" estas en tia stato fuŝa, ke la aspekto estas kortuŝa. Por esti uzeblaj, la redaktoro devas ilin tute reverki...se li povus ilin deĉifri.

Al la gvidanto precipe la malbonaj okuloj ne permesas tion fari. Sed la redaktanto siavice ankaŭ ne intencas difekti la siajn. Tial kelkfoje ili sendas la fuŝmaterialon rekte en la... paperkorbon.

Do, se vi volas, ke la fruktoj de via cerbkaj man-laboro vidu la "blankan mondon", skribu klare, nur sur unu flanko de l' papero kaj uzu kiel eble pli bonan materialon. *Aliel, viaj "trezoroj" senkompate flugos al... vi jam scias, kaj estos domaĝe por la uzita tempo kaj por viaj sendkostoj.*

I. H. K., red.

*

NIA POŜTO

3711. — Pro mia tiutempa foresto el Parizo la "elredakteja malpermeso" aperinta en n-o 143 ne estis de mi kontrolata k. ĝin mi ne aprobas ĉiurilate. Jen respondoj al viaj rimarkoj: 1. *uzino* ne estas internacia vorto, k. eĉ en Britio, la lando kie unue malvolviĝis grandskale la industrio, oni ne uzas ĝin (factory). Eĉ la idistoj uzas la vorton *fabrikerio,* ne uzino. 2. *demonstracio* estas ja oficiala vorto, sed ne kun senco politika; ĝi rilatas al matematiko. 3. via aserto, ke *organizo* estas *agado,* estas ne pruvita; por montri agadon ni aldonas la sufikson *ad* ĉe la radiko. Por esti tute logika en via argumentado vi devus postuli, ke ni uzu la formon "organizitaĵo". La logikemo en nia lingva afero estas ia idismo nepre kondamninda, se ni volas konservi al esperanto ĝian facilecon k. flekseblecon. 4. ni ne uzas ĉefliteron ĉe la vorto *esperanto* a) tial ke oni ne kutimas skribi nomon de lingvo kun ĉeflitero, b) tial ke ni ne volas partopreni en la mistika sento de la malnovaj esperantistoj, kiuj ĉefe skribas la vorton kun ĉeflitero por honori la "karan lingvon". Ni ankaŭ skribas la vorton *dio* sen ĉeflitero, kio certe ĉagrenigas la kredulojn. *E. L.*

5323. — Materialo abundas; ni provos tamen utiligi viajn sendaĵojn, almenaŭ parte. Artikolo pri la "Virino en Hindio" estos bonakceptata, tial ke ĝis nun malmulte aperis en "S-ulo" pri tiu mondparto.

"Saluto*n* al Sovetio" estus ja korekta k. mi persone preferas tiun formon; sed la manko de akuzativo ne estas eraro. Oni ja povas jene kompreni: Sovetio estu salutata. Ni ne devas kateni la lingvon per tro severaj reguloj. Nur la klareco gravas.

E. L.

Rolo (Sovetio). — Via letero estas tro longa por trovi lokon en "S-ulo". Cetere ĝia publikigo venigus certe ne malpli longan respondon. Ni ne povas plenigi la gazeton per polemikaĵoj. *E. L.*

SAT-ano pseŭdonima. — Jam aperis en "S-ulo" kelkaj artikoloj pri Bulgario, sekve ni ne povas utiligi vian manuskripton. Dankon! *E. L.*

10 041. — Bedaŭrinde la kaso de "S-ulo" ne permesas enmeti senpage anoncojn eĉ en formo de "informo". *Red.*

3201. — Tre interesa, sed pli taŭga por la Gazetservo de SAT, kien ni sendis ĝin. Ni mem havas tro da materialo por uzi ĝin tuj. *Red.*

9853. — Jes malaperis ankaŭ aliaj leteroj. Ekzistas tie kelkaj individuoj kun gluozaj manoj. *Adm.*

*

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

Britio. Pli granda nombro da kursoj ol iam antaŭe komencas sub la N. C. L. C. k. aliaj lab. organizoj. Post la sukcesa kongreso en *Leeds* okazis aliaj en *Tottenham, London Centra* k. *Manĉester.* 28. lab. organizoj reprezentiĝis ĉe la Lab. Klubo en Centra Londono en la BLEA-kongreso. Longaj raportoj pri tiuj ĉi kongresoj k. la VII-a kongreso de SAT aperis en *Dailly Herald, Sunday Worker, Stop Assistant Leeds Citizen* k. aliaj ĵurnaloj. Certe la brita Laboristaro aŭdis pri SAT k. es-po Prof. Collinson, K-do Boubou k. aliaj esp-istoj refutis la kritikon de esp-o farita de R. W. Postgate en la "Plebs". — **Finnlando.** La IV-a Kongreso de Socialista Sportinternacio Laborista (LSI), okazinta la 5.—9. aŭgusto 1927 en *Helsinki,* akceptis post parolado de K-do Kostiainen unuanime (nur franco detenis sian voĉon!) decidon favoran al esp-o. Krome, la kongreso decidis, ke la novefondita Intern. Gazetservo ankaŭ aperu en esp-o. Laŭ interkonsento kun EK. de SAT, nun ĉi gazetservo estos dissendata kun nia SAT-servo. — **Germanio.** SAT-Konferenco de la 5-a sektoro okazis la 11. 9. 27 en *Rheydt.* Ĉeestis 72 Gek-doj, inter kiuj 18 gastoj. Salutis la konferencon oficialaj reprezentantoj de la loka sindikatara kartelo k. de kompartio. La sektorkonsilanto, K-do Petersen, raportis pri "sektoraj aferoj" k. pro privataj cirkonstancoj rezignis pluan konsilantecon. Estis unuanime proponitaj K-do von der Heid kiel konsilant-kandidato k. K-do de Bruin (Nederlando) kiel vickonsilanto. Oni decidis aranĝi du sektorkonferencojn jare. K-do v. d. Heid raportis pri siaj impresoj de la VII-a, k. K-do Burger lekciis pri "Racia Vivmaniero". — Dimanĉon, la 11. 9. 27 kunvenis la SAT-anoj el *Frankfurt a. M., Mannheim* k. *Rüsselsheim* okaze de ekskurso. Sub prezido de K-do Roth okazis vigla diskuto pri la VII-a SAT-kongreso. En sia parolado pri "La vojaĝo de la III-a germana laborista delegacio al Sovetio" la sama K-do citis, ke tiaj vojaĝoj devas esti uzataj de la K-doj propagandcele k. kiel delegitoj estu laŭeble elektataj K-doj, kiuj jam scipovas praktike uzi esp-on. — **Sovetio.** En *Dnepropetrovsk* la 2. 9. 27 komencis studadon "Rondeto de esp-o" kun tre bona sukceso. La lernantoj de la rondeto rilatas kun lab. esp-istoj el Germanio, Aŭstrio, Svedio k. Anglio. Aliĝis al SAT kvar personoj. — En *Mariinsk* (Sibirio) okazis la 15. 8. 27 spektaklo, aranĝita de esp-istoj k. lab. poŝt-telegrafistoj, kun interesa ekspozicio el esp-aĵoj. La 3. 9. 27 en la klubo de fervojistoj estis parolado kun junularo pri esp. La lokaj murĵurnaloj presigas artikolojn k. kronikon pri esp-o. — En *Barnaul* (Sibirio) la 26. 8. 27 dum kultur-konsiliĝo de ĉiuj sindikataj reprezentantoj, K-do Goldfeder informis pri la signifo de esp-o por la internacia proletar-solidareco. La kultur-fako de distriktoficejo sindikata konsiderante la gravan valoron de esp-o proponas: 1. ĉiel helpi la organizadon de entreprenoj por ellerno de esp-o, 2. informadi la lab. amasojn pri la signifo de esp-o kiel kultur-eduka faktoro k. ilo de internacia prolet-solidareco, 3. utiligi la esp. rondetojn ĉefe por interligado kun eksterlandaj entreprenoj, ĉeloj partiaj k. junkomunistaj, profesiaj, "Mopr"-I. R. H. k. inter izolaj laboristoj. 4. plej baldaŭ alsendi la liston de dezirantoj ellerni esp-on k. tuj komenci la instruon. Por gvidi la suprenomitan kultur-klerigan laboron k. doni la necesajn informojn estas elektitaj K-doj Kozlan k. Goldfeder.

*

La gelaboristoj el Barnaul'aj ĉefaj vagonlaborejo kunvenintaj la 19. 8. 27 je vesperfesto, dediĉita al la patronataj de ili K-doj enkarcerigitaj en la malliberejo de *Stara-Zagora, Bulgario,* sendas al ili per "S-ulo" trans limoj, maroj k. montoj sian varmegan fratan saluton k. certigas, ke la komencitan batalon por liberigo de l' tutmonda Proletaro el la kapital-jugo ili daŭrigos ĝis la momento, kiam ne plu restos ie eĉ unu malliberigita proleto. La tuta monkolekto, farita en tiu vesperfesto, estas disponota al la persekutataj k. turmentataj familioj k. parencoj de la diritaj malliberigitoj en Bulgario. La "malfermita letero" finas: "Nia interligo estu garantio de nia komuna venko super la tutmonda burĝaro! Ni firmigu kun vi la internacian solidarecon proletaran k. unuecfronton pere de internacia proleta lingvo *ESPERANTO!*"

★ DIVERSAĴOJ ★

10-a Datreveno de la Sovetia Oktobra Revolucio

K-doj el Sovetio!

La Sekcio Aalsmeer de la "Internacia Laborista Helpo" intencas aranĝi

Sovetrusan Ekspozicion

dum la tempo de la 15-a oktobro ĝis la 15-a novembro.

Per tio ni celas atentigi la nederlandajn laboristojn pri la grava fakto de la ekzistado de Sovetio por la tutmonda Laboristaro kaj entuziasmigi ilin por la defendo de Sovetlando. Samtempe tiu ekspozicio klare montros kiom esperanto valoras por la laborista klaso.

Por tiu celo ni bezonas vian helpon — alvenigi la necesan materialon: objektoj, bildoj, statistikoj koncernantaj laboristan vivon, kamparanan vivon, ruĝarmeon, instruadon, ruĝajn anguletojn, infanprizorgon, ripoz- kaj kuracdomojn, kooperativmovadon, ateistan movadon, laboristajn klubojn, teatron, industrion, hejmindustrion ktp.

Se ni sukcesos fari belan kolekton, ni aranĝos ekspozicion en diversaj nederlandaj urboj.

Malgrandajn sendaĵojn per la poŝto oni sendu rekte al mia adreso, por pli grandaj aŭ kolektivaj sendaĵoj oni skribu al:

N. Karotam, ul. Rahova 17 komn. 331, *Leningrad,* kiu peros la alsendon.

Rekompence ni sendos nederlandajn produktaĵojn, ekz. florbulbojn aŭ florsemojn.

Objektoj, kiuj povas esti vendataj, ekz. objektoj el la kamparana hejmindustrio, ni ankaŭ volonte ricevos aŭ pagos.

K-doj, estas grava entrepreno! Pro tio multnombre partoprenu kaj tuj preparu, ĉar la tempo jam estas mallonga.

Por la Sekcio Aalsmeer de la I. L. H.,
M. Harmsen, Aalsmeer, Nederlando.

*

Al ĉiuj korespondoficejoj kaj individuaj labeskoj

Ĉe la Ŝevĉenkovska distrikta sindikata oficejo estas fondita esperanta konsultejo. Ĝia plej grava tasko estas interŝanĝo de korespondleteroj kun eksterlandaj laboristoj pri plej aktualaj temoj. La plej interesaj leteroj estos publikigataj en la sovetiaj presorganoj kaj la konformaj n-oj sendotaj al la korespondintoj. La konsultejo petas ĉiujn esp. korespondoficejojn kaj individuajn labeskojn skribi laŭ adreso: *Sovetio, Ĉerkasi Okruĵnoje Profbjuro Esperanta Konsultejo.* Tuja respondo al ĉiuj estas garantiata.

*

Esperanto-propagandistoj atentu!

Vi havas nun la eblon eluzi la plej belajn esperanto-paĝojn de AIZ por la esperanto-ekspozicioj. Laŭ peto vi senpage ricevos de ni aranĝon el 7 numeroj de AIZ kun detala presita instrukcio por gluado de speciala efika poresp-a afiŝo. Mendu tuj!

Esperanto-fako de Neuer Deutscher Verlag, Germanio Berlin W 8, Wilhelmstrasse 48.

*

Francaj abonantoj de AIZ (Laborista Ilustrita Gazeto Tutmonda) atentu! La ĝisnuna reprezentanto de AIZ en Francio ne plu estas Messagiere 1. Feiler, Paris, Hôtel des postes, boîte postale! K-doj ne ricevintaj la gazeton bonvolu repostuli de li sian monon kaj sciigi nin pri la rezulto. La nuna daŭra abonejo por AIZ estas:

Librairie Centrale, Paris,
Hôtel des postes, boîte postale III.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas **0,50 mk. or.,** ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, k. ĉ. l. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Belgio.

— La grupo "*Nia Ideo*" k. SAT-anaro de nun kunvenas en la "8-hora Domo" Carnot strato, 112, *Antwerpen,* ĉiusabate je la 8-a h. vespere.

Britio.

K-do *J. Barry,* 40, Whitehouse Rd., Abbey Hulton, *Stoke-on-Trent,* dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l., interŝ. librojn.

Adresŝanĝo: La membroj bonvolu noti la novan adreson de la *enlanda peranto* K-do *D. Sheriff,* 43, The Grove, *London, W 6,* same por K-dino *Helen Sheriff* k. K-do *C. H. Dierks.*

Bulgario.

K-do *Ivan D. Armin,* kv. Malak-Pariĵ, ul. 40, Nr. 19, *Plovdiv,* dez. koresp. pri div. temoj k. ĉ. l., L, PI, bfl., precipe kun gejunuloj. Ĉiam resp.

K-do *Marin P. Belel,* kv. Malak-Pariĵ, ul. 8, Nr. 40, *Plovdiv,* dez. koresp. kun ĉiul. gejunuloj, PI, bfl., resp. garantiata.

Ĉeĥoslovakio.

K-dino *Filomeno Lustinez,* Hopfengarten, 27, *Bodenbach, III.,* dez. koresp. kun perf. esp-istoj, anoj de la "naturamikoj" pri turismo, skisporto, migrado, naturbelaĵoj, vegetarismo ktp. Sendu PI de naturamikaj domoj!

Francio.

K-do *J. Wutte, Oberbetschdorf* (Bas-Rhin), dez. interŝ. bildojn pentreblajn pri homaj tipoj k. naciaj vestoj; koresp. kun lignaĵistoj, meblo-k. konstrudesegnistoj.

Germanio.

K-do *Friedrich Nitze,* librotenisto, Rosenstr. 12, *Zittau i. S.,* dez. koresp. pri div. temoj k. ĉ. l., precipe pri profesiaj demandoj, L, PI, bfl.

— Geknaboj (12—14 j.) dez. interŝ. L, PK, PI, kun samaĝuloj, loĝantaj ekster la germanlingva regiono. Adr.: K-do *Köckeritz,* Tharandter Str. 6, Dresden-A. 28.

Atentu! La SAT-grupo (Schweinfurt i. Bay.) aranĝas ekspozicion de 2.—6. 11. 27. Gek-doj de ĉ. l. estas petataj sendi PI. Adr.: *SAT-grupo,* Theresienstr. 5, II., *Schweinfurt i. Bay.*

K-do *Willy Fleissner, Burkhardtsdorf i. Erzgeb.,* dez. koresp. *nur* per PI, bfl. Ĉiama resp. garantiata.

K-do *Fritz Löschner,* Siedlung, *Kemtau i. Erzgeb.,* dez. koresp. k. ĉ. l., L, PK, PI. Ĉiam resp.

K-do *Artur Puchert,* Harzer Str. 88, *Berlin, SO, 36,* dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l., L, PI, PM.

K-do *Paul Liebeskind,* Wiesenstr. 7, *Liebertwolkwitz b. Leipzig,* dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l., L, PK, PI. Resp. garantiata.

K-do *Oskar Naumann,* (34 j.), Langestr. 43, I., *Pirna a. E., dez.* koresp. k. ĉ. l. pri racia vivmaniero, L, PK.

— SAT-rondo de Neugersdorf dez. koresp. k. ĉ. l. pri ĉ. temoj, precipe L. Adr.: K-do *Herm. Hoffmann,* Bergstr. 14-b, *Neugersdorf i. S.*

Adresŝanĝo: K-do *Karl Dobeck* (4151), Bismarckstr. 14, ptr., *Falkenstein i. V.* (antaŭe Gartenstr. 77).

Hungario.

K-do *Stefano Paŭlo Nolipa,* Hunyadi-u. 15. sz. *Pesterzsébet,* kolektas k. interŝ. esp. glumarkojn.

— Gek-doj volas koresp. pri ĝarden- k. abelkulturo, same pri a. temoj k. ĉ. l. Adr.: *Ladislao Selmeczy,* Akácfa-u. 14, sz. *Vecsés.*

Portugalio.

Adresŝanĝo: La Laborista Esp. Societo "*Nova Vojo*" nun loĝas en Rua da Flores, 13, 1°, *Lisboa,* (stratŝanĝo).

Sovetio.

— Por tutmonda piedvojaĝado ni serĉas kunvojaĝantojn el Anglio, Francio — laŭeble kun fotoaparato. Skribu al: K-do *Teo Heeger* ĉe Kazina, ul. Zencova, 166, *Ufa.*

K-do *A. Vagner,* skola, 2, *Naro-Fominsk,* Mosk. gub., dez. koresp. pri div. temoj, literaturo, klerigo, L, PI. Rapide resp.

K-do *A. Lapustin,* Ojrotskaja ul. 30, *Ulala,* Ojrotsk. obl., dez. koresp. k. ĉ. l. L, PK, PI, interŝ. gaz. ĵurn.

K-dino *K. Kastova,* ul. Volodarskogo, Titovski per., *Naro-Fominsk,* Mosk. gub., pri div. temoj, L, PI.

PETRO

La fama lerno-legolibro kun **ruslingva** vortar-ŝlosilo speciala estas ricevebla el la **Kremenĉuga Esperanto - Agentejo, KREMENĈUG, Dom Sojuzov, "ESPERANTO".** Prezo (afranko inkluz.): 50 kop.

ATENTU!

Kamparanaj k. Lab. Korespondantoj de Ŝadrinska "Krestjanskaja Gazeto" dez. koresp. pri ĉ. temoj kun ĉiul. Gek-doj. Ĉiuj taŭgaj leteroj estas presataj en ĉi-ĵurnalo.

Adr.: Sovetio, Uralo, **Ŝadrinsk,** red. "Krestjanskaja Gazeto" al K-do **Vlasov Jakov.**

Aperis germanlingve:

Wendel,

La eklezio en la karikaturo

Enhavas 125 bonegajn ilustraĵojn, anekdotojn, proverbojn kaj kantojn. Prezo: bindita tole, sur bona papero 3 mk. g.

Ĉiun germanlingvan literaturaĵon prizorgas laŭ originalprezoj de la eldonistoj: **Kurt Hubricht, Leipzig O 30, Germanio, Mariannenstr. 22, I. Poŝtĉeko n-o 43 808.** — Se vi interesiĝas pri iu literatura fako, vi regule senpage estas informata per prospektoj kaj katalogoj pri la novaĵoj en via fako.

ATENTU!

La Lab. Esp. Grupo (LEA) aranĝos la 6. 12. 1927 **"Letervesperon".** Ni ĝentile petas ĉiujn grupojn, izolulojn k. Gek-dojn sendi al ni L, PK, PI, ktp. Anticipan dankon al ĉiuj. Resp. gar.

Adr.: **Laborista Esperantista Grupo,** Breitegasse, 25/27, Buchhandlung "Fränkische Tagespost", **Nürnberg,** (Germ.).

ATENTU!

Pro okazonta la 7. 11. 27 en Sovetio festado de la Oktobra Revolucio ni atendas salutleterojn el ĉiuj landoj por diversaj proletaj organizoj kaj gazetoj de urbo Rostov-Don.

Adr.: **Esperantista Komitato,** Poŝta kesto, 82, **Rostov-Don** (Sovetio).

ENHAVO:

Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo, de E. Lanty . . . . . pĝ. 1
Mia buĝeto, de (2978) . . . . . „ 2
El la sendependa Ĉeĥoslovakio, de (7321) . . . . . „ 2—3
Letero de malliberigita K-do en Lodz, de (5981) . . . . . „ 3
Altaj salajroj en Usono, de Internacia Laboroficejo . . . . . „ 3
La anarkiista movado en Sud-Ameriko, de INO . . . . . „ 4
Boris Stefanov, trad. I. H. K. . . . . „ 4
Faktoj kaj komentoj . . . . . „ 4
Marŝipo kondukata per unu sola homo . . . . . „ 4
Sennaciula Sporta Paĝo, de (2518) „ 5—6
Tra Esperantio . . . . . „ 6—7
Diversaĵoj . . . . . „ 7—8
Korespondado, anoncoj . . . . . „ 8

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)